

REVUE

FRANÇAISE

D'ESPERANTO

FRANCA ESPERANTISTO

Fondée en 1908 — 39<sup>e</sup> année — 3<sup>e</sup> série — N° 267 — FEVRIER-MARS 1971

ALVENAS PRINTEMPO . . .

=====  
Post la senvivaj vintraj monatoj, subtere aktivas misteraj fortoj, kaj subite ekkrakas la burĝonoj, ekŝvelas la floroj, rekantas la birdoj en la silentaj arbaroj; la tuta naturo ĝojas pro sia ĉiujara renaskiĝo.

Post niaj vintraj kursoj, preskaŭ kaŝe gvidataj en la kvieteco de la lernoĉambroj, ĉu ni povos ekĝoji pri novaj sukcesoj, ĉu aperos novaj burĝonoj, novaj floroj en nia franca asocio, ĉu niaj muroj ekkrakos sub la premo de niaj novaj fortoj, ĉu ni povos prikanti nian renaskiĝon, ĉu ni povos krei tra la tuta lando:

NOVA PRINTEMPO ALVENIS.....?

J. VINCENT  
=====

# FRANCA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE U.F.E. (Unuiĝo Franca por Esperanto)

34, rue de Chabrol, Paris X<sup>e</sup> - Tél. : 770-55-03

ABONNEMENT ANNUEL : 30 Francs. — Le Numéro : 3 Francs (CCP 855-35 PARIS)

Rédaction :

André RIBOT

11, rue Vergne

47 - MARMANDE

Tél. : 7.30

Les textes à publier doivent être toujours dactylographiés avec double marge et double interligne.

Prière d'envoyer des clichés et non de simples photographies.

Les manuscrits non insérés ne sont pas renvoyés.

Joindre 0,80 F. en timbres pour tout changement d'adresse.

## BUREAU DE L'U.F.E. :

Président :

Dr André ALBAULT, 32, av. E.-Billières, 31 - TOULOUSE - 03.

Vice-présidents :

Gabriel ROUGETET (Relations extérieures, statuts), 71 ter, avenue Foch. 78 - SAINT-GERMAIN-EN-LAYE.

THIERRY Jean (affaires culturelles, enseignement extra scolaire), 5, rue Léon-Cogniet, 75 - PARIS-17<sup>e</sup>.

J. GUILLAUME (relations avec l'U.E.A., secrétariat administratif), à FEUCHEROLLES - 78.

Secrétaire générale :

Mme J. VINCENT, rue des Oiseaux, 27 - LES ANDELYS.

Secrétaire général adjoint :

Mme BALLAVEN (affaires générales), 18, avenue de Villiers, 75 - PARIS (17<sup>e</sup>).

Secrétaire chargé des finances :

Pierre ROYER, Estérel n° 2; 49, rue de Chatenay, 92 - ANTONY.

Trésorier :

J.A. ROUSSEAU, 64, avenue Jean-Moulin, 75 - PARIS (14<sup>e</sup>).

## Personnalités françaises patronnant l'action d'information sur l'Espéranto

L'information en faveur de l'usage de la langue internationale Esperanto dans le monde entier est soutenu en France par le patronage de hautes personnalités dans le Comité français d'information pour l'Espéranto, parmi lesquelles :

M. Alain POHER, président du Sénat, ancien Président du Parlement Européen.

M. Maurice GENEVOIX, de l'Académie Française ;

M. Jean ROSTAND, de l'Académie Française ;

M. Maurice FRECHET, de l'Académie des Sciences ;

M. Charles CAMICHEL, de l'Académie des Sciences ;

M. Georges AURIC, de l'Académie des Beaux-Arts ;

M. Jean CHARBONNEAU, de l'Académie des Sciences Coloniales ;

M. Pierre ESCOUBE, conseiller à la Cour des Comptes ;

M. Henri BAÏSSAS, inspecteur général de l'Education nationale ;

M. Paul MAUREILLE, Inspecteur Général de l'Education nationale ;

M. Maurice BAYEN, Recteur d'Académie ;

M. Emile DELAGE, Recteur d'Académie ;

M. Paul DOTTIN, Recteur d'Académie ;

M. Paul GERVAIS, Inspecteur Principal (Jeunesse et Sports) ;

M. LECLERC, Inspecteur (Enseignement 1<sup>er</sup> degré) ;

M. G. HERAUD, Professeur à la Faculté de Droit de Strasbourg ;

M. René COUTEAUX, Professeur (Faculté des Sciences) ;

M. André CAILLEUX, Professeur (Faculté des Sciences) ;

M. Marc EYROLLES, Président du Touring-Club de France ;

M. CHAREILLE, Président de la Chambre de Commerce des Métiers de la Creuse.

## COTISATIONS

U.F.E. :

Membre titulaire .....	30,00
Membre adhérent .....	6,00
Membre titulaire junior (— de 21 ans) .....	15,00
Membre donateur .....	45,00
Membre bienfaiteur .....	75,00
Membre titulaire à vie .....	600,00
Membre donateur à vie .....	900,00
Membre bienfaiteur à vie .....	1.500,00

U.E.A. (ces cotisations s'ajoutent aux précédentes) :

Membro jarlibro .....	23,00
Membro jarlibro (— 22-jara) .....	11 50
Membro abonanto .....	46,00
Membro abonanto (— 22-jaraj) .....	34,50
Membro subtenanto .....	69 00
Dumviva Membro .....	920,00

Nota : Nous rappelons que les cotisations doivent toujours être adressées au trésorier du Groupe local ou à défaut au trésorier de la Fédération.



02/91





Tria Komuniko

De la 9-a de aprilo ĝis la 13a

niakongreso okazos sub la al-

INTERNACIA

STAGĜO EN

GRÉSILLON

de la 3-a ĝis la 9-a de aprilo;

ta patronado de

S-ro Olivier GUICHARD, Ministro pri Nacia Edukado,  
S-ro Jean ROSTAND Scienca Akademiano

Akceptis ankaŭ esti en la Honor-Komitato:

S-ro Max MOULIN, Prefekto de la regiono,  
S-ro Louis PRADEL, Urbestro de Lyon,  
S-ro Pierre LOUIS, Rektoro de la Akademio de Lyon,

. . kaj multaj aliaj eminentuloj el la regiono.

La KONGRESEJO estos la Komerca Borso, Place de la Bourse, kie okazos la ĉefaj arandoj de la kongreso.

Tamen, la 9-an de aprilo, la AKCEPTO de la kongresanoj okazos en la ejo de la Fervojoj, 15 bis Place Jules Ferry, ĉe la stacidomo BROTTAUX, kie ili ricevos siajn kongresdokumentojn. La salono estos malfermita ek de la 9-a matene.

La VARIETEA VESPERO okazos en Salono MOLIERE, quai de Bondy,

la EKZAMENOJ en Lycée AMPERE, 31 rue de la Bourse,

la KATOLIKA MESO, en Chapelle des Clarisses, 20 rue Sala.

Ciuj aliaj bezonataj adresoj troviĝos en la Kongresa Libro.

Aliĝkotiĝoj: ĝis la 1-a de aprilo la kotiziĝoj, laŭ la kategorioj menciitaj antaŭe estas respektive 25 F. kaj 12,50 F. (senpaga por la eksterlandanoj).

Por la 10-a Kultura Semajno, kiu okazos en Grésillon, (49) Baugé, la kastelo malfermos siajn pordojn jam de sabato vespere la 3an de aprilo.

Partoprenos, ne nur studentoj de la fakultatoj de Aix-en-Provence kaj Clermont-Ferrand, sed ankaŭ liceanoj kolegianoj, seminarianoj el Britujo, Francujo, Germanujo, Italujo, ktp.

Inter la gvidantoj kaj prelegantoj estos S-ino CHEVERRY, S-roj ALBAULT, JANTON, LLECH-WALTER, RIBOT, ROUSSEAU, THIERRY, TURIN, k.a.

Petu informojn de S-ro Llech-Walter, 5 quai Vauban (66) Perpignan, aŭ de S-ro P. Babin, 13 boulevard de la Chauvinière (44) NANTES.

-----  
:-  
G.E.E.....G.E.E.....G.E.E.....G.E.E.  
=====

KIO ESTAS G. E. E. ?  
-----

G.E.E. transvivas nur pro tio, ke U.F.E. decidis teni ĝin viva pro la gravo de Esperanto en Lernejoj. Fakte la GEE de MICARD malaperis; nuna GEE estas nur la kolekto de instruistoj, membroj de U.F.E. U.F.E. monsubtenas tiun novan G.E.E. en la espero, ke ĝi laboros. Intertempe, necesus reformi novan Lernejan Komisionon. Mi intencas proponi, ke ĉiu Federacio elektu unu aŭ du personojn, kiuj zorgus en sia federacio pri lernejaj aferoj.

Ĉiuj ĉi personoj formas novan Lernejan Komisionon. Ilia tasko estos interŝanĝi spertojn, kaj instigi unu la alian.

Ĉiuj GEE-anoj estas petataj sendi sian opinion al: S-ro TURIN, 43, rue Emile Magnin (25) PONTARLIER, kiu raportos en Lyon.



# VIVA DE LA GRUPOJ

AMIENS - La 11-an de decembro la lo-  
===== ka grupo festis la dekan  
datrevenon de la ĝemeliĝo de la urbo  
kun Dortmund. Trarigardo en la pro-  
gramo de la diversaj okazaĵoj mon-  
tras, ke oni organizis nur sportajn  
kaj muzikajn prezentaĵojn, kio kom-  
preneble faciligis la renkonton, ĉar  
la partoprenintoj ne bezonis paroli;  
kiam oni fine akceptos Esperanton  
kiel pontlingvon, la homoj povos ti-  
am plej sincere amikiĝi...

CALAIS - Komuna kongreso kunigos en  
===== geesperantistojn el Belgujo  
Britujo, Francujo, kaj najbaraj lan-  
doj. Tiu - ĉi interesa manifestacio  
okazos de la 29a ĝis la 31a de majo.

Ĝi estos samtempe:

la 9-a markola kongreso,  
la 53-a belga kongreso,  
la Nordfranca kongreso (NEF),  
la Federacia renkontiĝo (SOEF) kaj  
la Unua markola junularkongreso.

Korespondadreso: S-ro DITACROUTE,  
178 Chemin Castre (F.62) Calais.

## ESSONNE - ESPERANTO

===== fait partie des  
nombreuses activités de Renaissance  
et Culture (association ahréée par  
le Ministère de la Jeunesse et des  
Sports).

Des cours gratuits d'Esperanto  
ont lieu les premiers et troisièmes  
jeudis à 21h. dans le local de cette  
Association à Ste-Geneviève-des-Bois  
(91).

ESSONNE-ESPERANTO organise égale-  
ment des rencontres entre espérantis-  
tes de l'Essonne, avec projections  
de films ou diapositives.

Lors de la rencontre du 31 janv.  
dernier, les participants ont pu  
voir les "Merveilles du Portugal",  
film en couleurs, parlant espéranto,  
de M. J.P.Peray, trésorier du groupe  
de Paris.

Programmes et invitations gratui-  
tes pour ces rencontres, sur simple  
demande à:

M. J.P. BONNE 39, rue Gai - Séjour à  
Ste-Geneviève-des-Bois (91) ou à  
M. H. HENRY 9 résidence Rochebrune -  
(91) BRETIGNY.

FISMES - Kurso okazas tie ĉiumerkre-  
===== de, kun 36 gelernantoj, ju-  
naj kaj maljunaj, sub la gvidado de  
S-ro TASSIN.

GRASSE - Esperanto-grupeto stariĝis  
===== fine de lasta novembro, kaj  
kurso funkcias sub la gvidado de nia  
amikino BARITEAUD.

LILLE - Federacia renkontiĝo okazos  
===== la 18-an de aprilo en la ka-  
dro de la Internacia Foiro. Oni an-  
taŭvidas ekzamenojn por novaj lern-  
antoj.

MANTES - La 25-an de aprilo okazos  
===== komuna kongreso de la nor-  
manda kaj pariza federacioj. Aliĝoj  
estas eblaj ĝis la 15a de aprilo.

NICE - La ĝenerala kunveno de tiea  
===== grupo, la 13-an de decembro,  
estis la okazo ankaŭ de amika  
bankedo, antaŭita de aperitivo-kon-  
certo.

ROUBAIX - Post simila kunveno en  
===== Lille, S-ro Hervé Gonin  
komentis dispozitivojn, kaj informis  
pri la nacia kongreso kaj la agado  
en la Rodana-Alpa Federacio. Krome,  
la membroj sendis 35 proponojn por  
la UEA-konkurso (varbosloganoj).

oo

Novaj libroj:

=====

ETA VIVO, Poemaro de Guglielminetti,  
Eld. Stafeto. Prezo: 11,50 F.

HUMOROJ, poemaro de William Auld  
Eld. Stafeto - Prezo: 11,50 F.

# RECENZOJ

SOLECO - Romano de Victor CATALA,  
===== El kataluna lingvo tradukis  
Josep VENTURA i FREIXAS - 287 paĝoj,  
Prezo: (broŝ.) 30 Fr., plus sendkos-  
toj.

Iam, en mia junaĝo, mi havis oka-  
zon legi la belan romanon SOLECO o-  
riginale verkitan en kataluna lingvo  
De tiam, multaj kaj longaj jaroj  
forpasis. Tamen, malgraŭ la tempo  
forfluginta, ankoraŭ mi gardas, kaŝ-  
ita en memoranguleto, la allogan im-  
preson, kiun kaŭzis al mi ĝia legado.

"SOLECO" estas la majstra verko  
de Caterina Albert i Paradis, glora  
kataluna verkistino, kiu sub la  
vir-seksa pseŭdonimo "Victor Catala  
atingis tre altan lokon en la Perna-  
so de nia regiona beletro. Ŝi mortis  
en 1966, en naskiĝvilaĝo La Escala,  
amata de ĉiuj, kaj en la zenito de  
sia gloro. Ŝi estis jam 96-jaraĝa.

Nun, kiam post tiom da jaroj mi  
legis denove ĉi tiun romanon - sed  
ĉifoje en esperanta lingvo - ĝia le-  
gado kaŭzis al mi la saman tiaman  
impreson, eble pli akcentitan pro la  
kontrasto inter la aktuala agitiga  
epoko kaj tiu alia, jam malproksima,  
ankoraŭ saturita de la lastaj influ-  
oj de la tiama ĵuspasinta romanti-  
ka skolo.

La traduko de Josep Ventura i  
Freixas estas, certe, ne nur sendis-  
kute perfekta, sed ankaŭ riĉa en lek-  
sikono, eleganta en la frazoj kaj  
trafa en la selekto de kunmetitaj  
vortoj. Ĉio ĉi tio donas al la tra-  
duko perfektan adaptiĝon al la kata-  
luna originalo, kaj permesas al la  
tradukinto konservi, fidele kaj ho-  
neste, ĉiujn detalojn kaj nuancojn  
de la ĉarmega prozo de la glora au-  
torino.

La temo de tiu romano estas simpla  
kaj tute ne komplika, krom en la  
lastaj paĝoj de la verko, en kiuj la  
morna kaj perfida figuro de la Spek-  
tro semas la malpacigon en la vivo  
naiva de Mila kaj Matio, kaj provo-  
kas la dramon per la murdo de la sa-  
ĝa paŝtisto, kaj per la seksperforto

de la virino sendefenda. Figuroj es-  
tasmajstre pentritaj sur la fono  
grandioza de alta montaro kataluna.

La ilustraĵoj, de Alexandre Coll,  
kiuj ornamas la libron, estas tre  
belaj kaj ege agorditaj.

Unuvorte: la romano "SOLECO", jam  
tradukita en pluraj lingvoj, meritis  
havi esperantan tradukon. Kaj jen ĝi  
estas, leginda kaj legenda, traduki-  
ta en sendifekta stilo.

Alvaro de ORRIOLS  
=====

MARY kaj SULO - koresponda rakonteto  
===== verkita de Kamemoro,  
Eld. Fondumo Esperanto - Iirislahti  
1969-15 p.-Prezo: 5,25F plus send-  
kostoj.

Ĉarma rakonto estas prezentita en  
formo de leteroj temantaj pri la  
amikiĝo de brita knabino kaj finna  
knabo. Ĝi taŭgas kiel facila legaĵo,  
por nova esperantisto, kiu antaŭ ĉio  
deziras korespondi kun amikoj el  
fremdaj landoj.

R. M.  
=====

O V O (Oportuna Vortaro de Ordina-  
===== Esperanto) - V. Setälä - Fon-  
dumo Esperanto Helsinki 1969 - 96 p  
Prezo: 5,25 F plus sendkostoj.

Jen estas bonega alfabeto sentra-  
duka vortaro ilustrita por la uzo de  
komencantoj kaj lernantoj. Ĉiu vorto  
estas klarigita per pli multe uzataj  
vortoj, kaj ofte per ilustraĵoj. La  
vortaro aperas sub la titolo "OVO  
ĉar ĉio viva venas el ovo", kaj tiu  
vortaro devas konduki "la lernanton  
al VIVA posedo de la centra vort-  
trezoro de Esperanto.

Robert MARTIN  
-----

KIAL MI KREDAS JE L'ISLAMO - radio-  
===== parolado  
de Hazrat Mirza Baŝiruddin, esper-  
antigis Pr.D-ro Chiussi. Eld. Ahmad-  
diyya Misio en Germanujo - 15 p. -  
15 x 10cm - Prezo 0,50 F plus send-  
kostoj.

La aŭtoro estas respektinda, ĉar

li montras, ke religio ne estas nura parola afero, sed ankaŭ ago laŭ fundamentaj vivreguloj, al kiuj li dediĉis sian tutan vivon. Aliloke, li komentis la "Noblan Koranon", kaj la tuta verko montras religian karakteron de alta nivelo.

Ĉi tiu libreto estas utila por informi nin pri la islama spirito. Esperanto devus helpi, plidisvastigi ĉiaspecajn informojn pri mondo ne bone konata. Ni jam havas la plezuron legi la imponan "Noblan Koranon" precize dank'al la traduko esperanta de D-ro Chiussi.

Kiam ni ĝuos poezian kaj prozan antologion de arabaj landoj?

R.M.  
=====

PARLER L'ESPERANTO - R. Volpelière -  
===== 10 F. afrankite -  
48-paĝa mimeografita broŝuro formato  
13x21.

La celo, eĉ se modesta, estas grava: paroligi esperantlingve tiujn multajn, kiuj ĝis nun sukcesas apenaŭ balbuti; krome, ebligi memlernadon al izoluloj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne povas aŭ ne plu povis sekvi kurson.

La metodo estas moderna: iom post iom enkapigi gramatikan strukturon kaj la vortprovizon necesan por ĉiutagaĵoj rekte ekde simplaj konversaciaj frazoj, kaj sonbendo estas havebla por tiuj, kiuj posedas magnetofonon. La tuto konsistas el sepdek lecionoj tre (eĉ foje tro) mallongaj, kies teksto du-lingva en du kolumnoj ebligas al la lernanto mem kontroli sian komprenpovon.

Nuntempe oni ne bezonas insisti pri la avantaĝo de tia metodo, kiu preskaŭ ĝeneraligis en lingvoinstruado: anstataŭ eldiri regulon ilustritan per disaj ekzemploj, prezenti tiujn frazojn eliritajn el viva teksto k. malkovrigi el ili la strukturan regulon. Sed ĝuste ĉi tiu dua fazo pri la malkovro supozigas diligen tecon de sperta kursgvidanto kaj ĉirilate en la nuna broŝuro mankas plu

rajn klarigojn, kiujn sendube la aŭtorino - jam de jaroj kursgvidantino - aldonos en venontaj eldonoj.

Kelkaj punktoj meritis plibonigojn aŭ pliajn klarigojn, ekzemple la prononcado de "e", "j", "kiu", "aŭ" kaj "eŭ", pri la karakterizaj finaĵoj de la parolelementoj, pri la uzo de "ci" pri la vort-ordo kaj -fardo, pri la predikativoj sen akuzativo, pri la al mova akuzativo.

Korektindaj estas jenaj: p. 7, 29, 30, "marŝis" anstataŭ "paŝis"; p. 13, 15 "sufiĉe" anstataŭ "iom"; p. 18, 40, 41 "sekvaĵo" anstataŭ "daŭrigo"; p. 22 "parton de (la)viando"; p. 25 la versoj de Verleno; p. 29 "la supra(n) herbejo(n); p. 29 "sole" anstataŭ "sola"; p. 33 "tiu-ĉi (sen streketo); p. 36 "sub la littapiŝeto(n); p. 38 "la plej malgrandan" anstataŭ "la pli malgrandan"; p. 39 "malprudente" anstataŭ "nesingarde"; p. 41 "sur une grammaire" (dans); p. 43 "prolongement" (prolongation); p. 46 ĉi-tie (sen streketo); p. 48 "tri kvaronoj(n)".

En la nuna stato la libreto (baldaŭ elĉerpita) liveras al kursgvidantoj tre agrablan bazan materialon, por ellabori lecionojn; per pliaj klarigoj en dua eldono la libro prezentos unu, el la plej trafaj metodoj por memlernado.

Jean THIERRY  
=====

LATVA POEZIO 1945 - 1966 - Eldonejo:  
===== Zvaigzne  
en Riga 1968 - 70 p. formato 10/14.

Jen kolekto de versaĵoj, verkitaĵoj de 22 latvaj aŭtoroj. Post ses paĝoj enkiuj la latva poezio estas historie prezentita, oni povas legi vere diversstemiajn poemojn, popolajn kantojn, rekviemon al amo, elektrotrajno-poemon, k.t.p...

Ĉarma libreto, kiun vi povas "por vivo kaj por kor". Nun, ni dezirus latvan prozon...

Robert MARTIN  
=====





# 'KRONIKO'

## KAPREOLKAPTADO

=====

Estas vespere, en la arbaro la tuta familio estas kuniganta en la granda ĉambro; ekstere ŝtormas, sed en la ĉambro la kamenfajro disradias mildan varmon. La patrino kudras dum la patro legas la tagan gazeton, kaj fumus pipon. La infanoj faras siajn hejmtaskojn.

Subite, la lastnaskita filineto kiu ĝis nun ludis kun sia pupo diris "Paĉjo, kion vi faris hodiaŭ? vi ŝajnas laca?"

- Jes, karulineto, mi estas; ni kaptis kapreolojn.

- Ĉu kapreolojn vi kaptis? Kie kaj kiel vi faris tion? Ĉu vi kaptis ilin per kaptoŝnuroj?

- Ho ne! ni kaptis ilin per retoj

- Per retoj? kiel la fiŝojn? Ĉu vi sola? rakontu, paĉjo...

- Ni estis ĉirkaŭ kvardek viroj; ĉiuj arbargardistoj de la regiono kaj kelkaj hakistoj, kiujn la ĉefingeniero kunvokis frumatene. La distriktestro, je la kvara, metigis flagrubandojn, ĉirkaŭ la elektita distrikto, proksimume 300 hektaroj, kaj, je la sepa matene, ni metis la

retojn kaj aliajn flagrubandojn por enkadrigi malpli grandan spacon, kiun la hakistoj trapaŝis por vekti la kapreolojn.

Ĉiu reto estas kvindek metrojn longa, unu metron kaj duonon larĝa, kaj havas maŝojn kvadratajn de dek-kvar centimetroj. La flagrubandoj konsistas el kvindek metroj da longaj ŝnuroj kun ruĝaj kaj blankaj tukopecoj, longaj je kvindek centimetroj. La arbargardistoj, je du por reto, lokas la retojn sur bastonegoj tiamaniere, ke ĝisfalos ĉiam laŭ la direkto de la ĉasesplorado. Ambaŭflanke de la retoj oni metas, aŭ pli bone oni alkroĉas, sur la arbustoj, funelforme flagrubandojn por inciti la kapreolojn kaj ebligi ilin kuri el la reto, kiun ili vidas malpli bone. Kiam la reto kaj la flagrubandoj estas lokitaj, la du gardistoj kaŝas sin malantaŭ dika arbo.

Post korntrumpsignalo, la hakistoj trabatas bruegeme la arbaron precipe la arbustaron, kaj la rubusojn, por ebligi la arojn da kapreoloj kuri sur la retojn.

La flagrubandoj, la krioj de la hakistoj timigas la bestetojn, kaj ili provas salti trans la retojn. Kelkaj viglaj sukcesas, la aliaj eskaptotaj.

Joseph KRAEMER

=====

(daŭrigota)

# HELSINGÖR 1971

## 40-JARA FERIA KURSARANĜO

La internaciaj feriaj Esp-kursoj de Helsingör okazos 25/7 - 1/8 en la internacia Altlernejo (tute moderna). Venu al Danlando por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo kaj por partopreni nian 40-jaran jubilean aranĝon Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,

Ingemannsvej 9, DK-8230 **Abyhj**, Danlando.

**N B.** — Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Arhus, Danlando, 17/23-10-1971. Programo baldaŭ havebla ĉe L. Friis.

=====

....Direktoro Vogel estis dika viro, sesdekjarulo, kun barbo griziganta, mallonge tondita. Ĝi ne plilongigis la vizagon, apenaŭ nur plirondigis la formon de la kapo, kiu pro elstarantaj vangostoj, memorigis pri mongola deveno. Dum la daŭro de l'bablado direktoro Vogel frapetis per kraĵono sur sian skribo-tablon, iam-tiam li levis, ŝajne sen ia kaŭzo la brakojn alplafone kaj reprenis la interrompitan tamburadon, ĉe kio li ofte kaj ofte, kvazaŭ tikmove, per nerve kurbigo de l' manartikoj repuŝis la blankajn, amelitajn mamumojn, kiuj-tial, ke ili estis nur enŝovitaj en la manikojn kaj ne butonumitaj al la ĉemizoj-re-kaj-ree elglitis...

D-ro Kiebitz, la studento en la instituto Vogel, estis longa, pala, persono, k u n malmultaj haroj, siatempe eble plaĉe blondaj, sed nun kvazaŭ ellavitaj, kaj pro tio kolore ne difineblaj. Liaj lipharoj, sam-specaj, estis tro ŝpare plantitaj ĉirkaŭ buŝo preskaŭ senlipa kaj, pli grave, preskaŭ sendenta. Verdire ili kresketis nur super la buŝanguloj, de kie ili falis kiel linfadenoj senvivaj, po deko ĉiuflanke, sekvante dum sia strebo malsupren du sukretliniojn kiuj plilongigis ĝis la mentono l a melankolion de l'buŝo. Krom tio D-ro Kiebitz havis eluzitan distorditan nazumen, kies rajdpozicio s u r lia nazdorso estis, ĝuste pro malsimetrio de l' pinĉilpartoj, konstanta spitado al la bazaj principoj de l' ekvilibro. Sed, k i e l fojfoje dum cirkaj spektakloj, ŝnurego kunligas tro aŭdacan aŭ tro novican akrobaton al firma trabo, p o r reteni lin dum ebla falo, tiel same al la sendisciplina nazumo de d-ro Kiebitz, iu ĉeneto ankrita malantaŭ la orelo, donis iom da sekureco. Lia voĉo estis malforta s e d kiam li ardiĝis pro kiu ajn kaŭzo, ĝi facile altiĝis ĝis neverŝajnaj sopranoj.

La bruego de la atommotoroj nun transiĝis al orel - surdiga tondrado akompanata de regulaj eksplodoj. Fortega vibrado trakuris la korpegon de l'raketo.....

Mort-angoro atakis min. Miaj manoj febre serĉis la bukzonojn. En la sama momento, subita ekskuo tremigis la tutan ejon. Mi estis ĵetata supren....baraktis serĉante ian apogilon..ruliĝis trans la tablon...falas en la brakojn de Rosvita...Ŝia forta brako altiris min. En la lumo fulmanta de la plafono, mi konstatis kun teruro, ke ŝia kolo kaj ŝiaj dekoltitaj ŝultroj estis kovritaj de sango

Mi ekkriis, sed ŝi skuis la kapon kaj ridete montris sur la malplenan vinglason ĉe ŝiaj piedoj. Nur la ruĝega vino elverŝiĝis sur ŝin. Ĝojego vivigis min. Mi volis kisi ŝin. Sed, mi ne sukcesis.

Nova ekskuo ĵetegis nin de la divano kontraŭ molan vandon. Rosvita estis firmiteninta min, per unu brako ŝi alpremis min. Per la libera mano, ŝi ekkaptis bukzonon, kaj kroĉis nin ambaŭ al unu el la latunaj teniloj en la muro... Ŝajnis, ke ni ne elsavos nin e l tiu infero de eksplodantaj naturelementoj.

Kaj malgraŭ ĉio mi sentis feliĉegon en la brakoj d e Rosvita. Ŝia varmega vango t u ŝ i s mian vizagon kiel arda fajro. Ŝiaj molaj lipoj premis mian oreton. Ŝia spiro iris rapide, plenigis mian kapon per sveniga muĝado. Ŝia brako ĉirkaŭpremis mian nukon k i e l dolĉa kateno. Mi sentis ŝian tremantan korpon tiel intime, en tia sorĉanta kunfandiĝo, kian apenaŭ sentis iam ajn amanto en brakoj de amata virino.... Jam mi ne timis la morton. La infero furiozanta ĉirkaŭ ni fariĝis por mi ĉielo de feliĉego.

- - - - -  
ĉu vi konas tiujn tekstojn?

La respondo estas en  
tiu numero.

S E R V I C E D E L I B R A I R I E (Extraits)

ETUDE ET ENSEIGNEMENT

ABC à l'usage de ceux qui aiment les lettres (Waringhien).....	3,50
Esperanto fil d'Ariane.....	18,00
ESPERANTO MANUEL (+corrigés)..	8,00
Esperanta proverbaro .....	9,50
Esperanto vivant .....	22,00
Fundamento (La) .....	13,50
GVIDLIBRO por la ekzamenoj....	2,50
Lingvaj Respondoj.....	7,50
Manuel d'Etudes (Couteaux)....	5,00
Manuel d'Initiation (Thaillet)	1,80
Manuel de perfectionnement....	5,00
Manuel prépar. Kapableco.....	6,00
Ni parolu en Esperanto.....	5,00
Nos premiers pas en Esperanto.	2,50
Ludoviko en Nederlando.....	22,00
Privilegia Vojo (Setälä).....	5,50
PROGRAMME DES EXAMENS.....	0,50
Valeur pédag. de l'Esperanto..	0,60
Por la praktikantoj (Babin)...	8,50

DICTIONNAIRES-LEXIQUES-VOCABULAIRES

Dict. F-E (Léger-Albault).....	20,50
Dict. Pratique (F-E/E-F).....	15,00
Grand Dictionnaire Esperanto-français (Waringhien).....	38,50
LEXIQUE Esperanto-français....	6,00
NAULINGVA ETIMOL. LEKSIKONO....	11,00
PLENA ILUSTRITA VORTARO.....	145,00
Plena vortaro de Esperanto... ..	20,00
Vocabulaire de poche (Bastien)	4,00

HISTOIRE DU MOUVEMENT

Docteur Esperanto (Le).....	6,50
D-ro Zamenhof (Boulton).....	21,00
Historio de la lingvo Esp° ...	10,00
Leteroj de Zamenhof (I et II).	28,00
Originala verkaro de Zamenhof.	22,00
Vivo de Zamenhof (Privat).....	9,00

Litterature

=====

Brulanta sekreto (Zweig).....	1,85
Dia Komedio (la).....	60,00
Edelvejso kaj 3 vagabondinoj..	4,00
Esperanta antologio relié... ..	24,50
broché... ..	21,00
Eta Princo (tr. Delaire).....	20,00
Georgo Dandin .....	5,00

Fabeloj de Ander sen vol.I..	18,00
vol.IV.	18,00
Ĝoja Podio (La) (Schwartz)..	6,00
Hamleto (tr. Zamenhof).....	14,00
Hundo Kruso (La) .....	2,50
Kantoj kaj Romancoj (Heine).	27,50
KARIO (E. Privat) .....	2,00
Karnavalo kaj somnambulino..	2,00
Kiel akvo de l'rivero relié.	22,00
(R.Schwartz) broché	17,00
Malsata ŝtono (Tagore).....	18,00
MARTA .....	15,00
Mokindaj Preciozulinoj.....	1,20
Naŭzo (la) (Sartre-Bernard).	18,00
Nobla Korano (la) relié 2é ed.	58,00
Normandaj Rakontoj (La)....	17,00
Novaj esperanto-historietoj.	6,50
Nokto da timo (Pott).....	7,50
Parnasa gvidlibro.....	10,00
Paŝoj al plena posedo.....	12,00
Quo Vadis (trad. Zamenhof)..	16,00
Revizoro (la) (Gogol).....	4,50
Sen Eliro (Sartre-Bernard)..	8,00
Taglibro de A.Franck (relié)	12,50
Livres ill.pour les Jeunes..	10,00

PHILOSOPHIE ET RELIGIONS

MAKSIMOJ (La Rochefoucauld).	2,00
TIO,KION MI KREDAS (Rostand)	3,00
Sankta Biblio, relié.....	22,00

GEOGRAPHIE - VOYAGES

Ekspedicio Kon-Tiki, relié..	20,50
Gvidlibro tra Parizo.....	12,00
Kanako el Kananam.....	12,50
Nepalo malfermas la pardon..	17,50

ARTS SCIENCES TECHNIQUES

Amuzo per scienco (relié)...	6,00
Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj	12,00
Vivo de la plantoj.....	12,00

DISQUES

Cours en 6 disques & 7 livrets	84,00
Disque de prononciation.....	4,00
Feliĉo (la) (R. van Dalsem).	4,00
Kultura valoro de I.L. ....	13,50

FRAIS: 20% jusqu'à 20 F; 15% jusqu'à 40 F. et 10% au dessus.